

ESPERANTO EN MARCHÉ



ni faris

VESPA PIKNIKO, LASEMO,
ASSEMBLÉE GÉNÉRALE

ni faras

KURSOJ EN HUY KAJ LIEÛ

ni faros

17 DECEMBRO: TUTBELGA
ZAMENHOFFESTO

Revue trimestrielle belge

AUTOMNE 2022 - N°3

Informations Informoj

L'asbl Espéranto Wallonie (anciennement APE) a pour objet la diffusion de l'espéranto, langue auxiliaire internationale, conçue dans le but de faciliter la communication entre locuteurs de langues maternelles différentes.

La V.Esp-o (Espéranto Wallonie) agit en Wallonie directement ou en soutenant les groupes locaux, les tables de conversation et toute initiative individuelle, avec le support de la FWB.

Ses principales activités sont l'organisation d'événements et de formations, la participation à des festivals, le support des Verdaj Skoltoj, des groupes locaux et des tables de conversation.

Comment soutenir nos actions ?

- Participez à nos événements
- Contribuez à cette revue
- Rejoignez notre équipe
- Devenez membre
- Offrez-nous un café via un don mensuel de 3 € ou plus sur notre compte avec la mention « don »

Avec le soutien de



FÉDÉRATION
WALLONIE-BRUXELLES

Devenir membre / Membriĝi

MEM (membre > 25 ans + revue) 25 €

JUN (membre < 25 ans + revue) 12 €

FAM (cohabitant pas de revue) 5 €

REV (abonnement revue seule) 12 €

À payer sur le compte d'Espéranto Wallonie

BE72 0003 2585 3716 avec les mentions correspondantes. Voir sur le site

www.esperanto-wallonie.be

E-mail : esperanto.wallonie@gmail.com

Nos partenaires / Niaj partneroj

- International : Universala Esperanto Asocio (UEA) Rotterdam et SAT (Paris). Point de contact, Claude GLADY : 071 644 916 cglady@arcadis.be
- Belgique : Belga Esperantista Federacio (BEF). La coupole du mouvement. www.esperanto.be/bef Kristin TYTGAT: 03 322 80 70 kristin.tytgat@skynet.be
- Flandre : Flandra Esperanto-Ligo (FEL) 03 234 34 00 www.esperanto.be info@fel.esperanto.be
- Bruxelles : Esperantista Brusela Grupo (EBG). Nikolao de BUYL : nikolao@esperantobruselo.org 0478 382 981 www.esperantobruselo.org
- Verviers (Senlime) : Jean-Marie JACQUES 087 330 292 jacques@senlime.org
- Jeunes : Verdaj Skoltoj, asbl. Scoutisme sans frontières en espéranto. info@verdajskoltoj.net Valère DOUMONT 0485 517 552 www.verdajskoltoj.net

Contenu / Enhavo

LaSemo 2022 - 5
Ĝenerala asembleo - 6
Vespa pikniko - 8
La Beneluksa Kongreso - 9
Belgicismes et EO - 12
Multlingva Akcelilo - 14
Bildoj Konfuzilo - 15
Esperanta komunumo - 16
Novaĵoj de Esperantujo - 18

Colofon / Kolofono

Ce magazine est édité
par l'asbl Espéranto
Wallonie - Rue de la
Terre Franche, 33 -
5310 Longchamps.
Rédacteur en chef :
Jean Annet
Rédaction et mise en
page : Yves Nevelsteen
Imprimé par Lebrun
Communications à Strée



Éditorial Antaŭparolo

Saluton al ĉiuj

Nous avons eu l'occasion de nous revoir lors de plusieurs activités pendant les vacances et encore dernièrement lors de la Vespa Pikniko et du Beneluksa Kongreso. C'est

toujours pour moi un grand plaisir de rencontrer de nouvelles personnes qui sont dans le mouvement depuis des années ou qui commencent à y entrer. Peut-être est-ce une idée, mais j'ai l'impression que cela bouge un peu plus ces derniers temps, qu'il y a plus de monde qui s'intéressent à l'espéranto. Dernièrement, nous avons été contactés par une personne de la Fédération Wallonie-Bruxelles. Elle souhaitait avoir du matériel sur l'espéranto pour donner aux instituteurs dans le cadre du cours 'Éveil aux langues'. Ce cours est obligatoire maintenant à partir de la 3^{ème} maternelle. On vous en reparlera dans le prochain EEM. Nous avons eu également une demande d'interview dans le cadre de la Journée européenne des langues. D'autre part, il y a un nouveau cours qui démarre à Huy, pour lequel il y a eu un article sur l'espéranto dans le journal 'Vers l'Avenir'. Tout cela est très enthousiasmant ! Pour les prochaines activités, il y a des cours qui s'organisent à Hameln en Allemagne, au château de Grésillon en France, plus toutes les activités habituelles un peu partout en Europe et dans le monde. Voir eventaservo.org Et d'ores et déjà, nous vous proposons de prendre date le 17 décembre prochain pour la Zamenhofa festo à Ostende (voir en page 19).

Bonne rentrée en Esperantujo.

Jean ANNET



LaSemo 2022 avec Rob Hopkins

La transiro glate, sed persisteme!

La 10-an de julio, la festivalo LaSemo – *la semence* en la franca – denove ravis nin, post 2 jaroj da virtuala organizado. LaSemo organizas dek mondojn por revii: mirlando por la etuloj, amuzejo por ĉiuj aĝoj, klaĉejo por inspiri, zenejo por reŝargi sin, imponaj stratspektakloj, kafejoj por kvietigi vian soifon, kampadejoj por loĝi kaj dormi! La V.Esp-o invitis festivalanojn malkovri aŭ retrovi Esperanton. Rob Hopkins igis nin sonĝi per sia projekto *Cities in Transition*. Por elpensi post-nafto-societon, post-kreskan ekonomion, tiu ĉi brita profesoro pri permakulturo komencis iun tagon en 2005 frapante la pordon de siaj najbaroj en Totnes, por ke ili kune konstruu ĉi tiun novan urbon. Reinterpreto de la punka filozofio kiun li mem faris: *Do it yourself* (DIY, faru ĝin mem). Kaj en 2010 li verkis « manlibron pri transiro »; hodiaŭ miloj da urboj reinventas la manieron moviĝi, manĝi, loĝi, translokiĝi, komencante de la projektoj imagitaj de siaj loĝantoj kaj ilia kapablo fari aferojn alimaniere. Kion li dividis kun ni?

Turnu vin al najbaro ĉi tie, kiun vi ankoraŭ ne konas. Imagu la mondon post dudek jaroj, kie estus bone vivi por la plimulto, mondo kun malpli da CO₂, malpli da naftopoluado kaj interŝanĝu vian vizion. Kiel Walidah Imarisha montris, la limoj de niaj projektoj estas preskribitaj de la limoj de nia

imago. Kiel vi povas imagi vivon sen fosilia brulaĵo? Arto kun biodiverseco. Ekzemploj, Barcelono anstataŭigis aŭtojn kaj avenuojn per ĝardenoj... Friburgo aranĝis la urbon por piedirantoj, bicikloj kaj tramoj. Se ni volas konstrui alian eblan mondon, ni unue devas imagi ĝin kaj tiucele ni devas sukcesi forgesi ĉiujn erarajn kaj mensogajn utopiojn, kiuj regas nin kiel « la nevidebla mano de la merkato », la bezonon repagi nelegitimajn ŝuldojn, la privata proprieto de komunaj varoj, la utileco de reklamado aŭ lobioj...

Ni provis la eblan kaj ĉi tio kondukas nin al kolapso, ni nun devas imagi kaj testi la neeban: redukti la konsumon, izoli vivejojn kaj evoluigi vere verdajn energifontojn, transloki manĝaĵojn kiel iniciatita en Lieĝo kun la *Ceinture Alimenterre* (<https://catl.be>), zono kiu komenciĝis en 2014 kreis 27 novajn kooperativojn kaj kreis laborpostenojn; lanĉi, antaŭenigi kaj uzi lokajn valutojn, relanĉi civitanan partoprenon kiel Bolonjo faris en 2013. Resume, metu la imagon en potencon. Kaj ĝuste, se oni parolas pri la lingva problemo, Esperanto estas la ne imaginebla, facila, egalrajta solvo. Ni nur devas instrui ĝin ĉie en la mondo kiel dua lingvo!

Eric NEMES

Assemblée générale de la V.Esp-o

Ĝenerala asembleo: raportoj kaj planoj

En raison d'un manque de connexion internet durant le Beneluksa Kongreso à Ypres, cette année l'Assemblée Générale a eu lieu chez Jean Annet à Éghezée, le 11 septembre 2022 à 10h, juste avant l'ouverture du Pikniko. En voici un bref compte-rendu.

Accueil de 2 nouveaux membres effectifs : Michèle Villers-De Meyere et Marilyn Droog, suivi de l'entrée en fonction d'un élément féminin dans le conseil d'administration : Catherine Royaux (déjà membre effectif). Actuellement, V.Esp-o totalise 18 membres effectifs.

L'année 2021/2022 a été riche en événements divers :

- Organisation du Beneluksa Kongreso à Charleroi du 1 au 3 octobre 2021, avec plus de 50 participants et un bilan financier positif.
- Conférence à l'UTD de Huy le 21 février sur « l'Espéranto, la Langue Universelle ».
- PEKO, organisé par les Verdaj Skoltoj du 3 au 6 mars 2022, a été un succès. Au printemps 2023, il sera à nouveau organisé à Tilff.

- Participation aux Flandraj Ardenoj, événement organisé par Piet Glorieux le 8 avril et commenté par un guide nature parlant espéranto.
- Tenue d'un stand à Tilff du 27 au 29 mai par Liège-Espéranto, en partenariat avec une association locale pour la lecture et l'écriture.
- Participation à La Semo les 9 et 10 juillet. Contacts intéressants, notamment avec la Princesse Esméralda de Belgique et Rob Hopkins de Totnes.
- Distribution de folders durant l'événement Retrouvailles à Liège, les 3 et 4 septembre.

L'effort pour promouvoir l'espéranto commence à porter ses fruits. L'isolement imposé par le Covid aura encouragé les activités sur le net et stimulé la reprise en présentiel.

- Cours ou rencontre à Charleroi, Louvain-la-Neuve, Huy, Mery, etc.
- Table de Conversation à Liège.
- Elaboration d'un guide touristique en français/espéranto.,

- Cours par internet durant un an, animé par Yves Nivelsteen.
- Annonce régulière des différentes activités espérantistes sur Eventa Servo (Yves).

ou en Allemagne (octobre 2023 à Hameln) afin de progresser plus rapidement. Toutes ses activités sont une belle occasion de se revoir et de renforcer nos liens !

De nouvelles idées ont été abordées, en voici quelques-unes :

- Legs en duo pour financer une Asbl (Georges).
- Multiplication des séances d'information sur l'espéranto, dans des lieux différents (Eliane).
- Dépôt de la brochure « L'espéranto, c'est dans la poche » dans les endroits publics (Georges).
- Représentation d'un fakdeligito de l'UEA en Wallonie (Eric).
- Vente d'articles publicitaires pour promouvoir la langue, comme T-shirt, sacs en tissu ou autres.
- Présence envisagée à des événements comme « Maintenant ! » à Namur et « La Foire Verte » à Cerfontaine.
- Participation recommandée dans des stages à l'étranger, ex. aux Pays-Bas à la "studosemajnfino" (du 14 au 16 octobre à Almelo)

Pour terminer, Jean Annet a été félicité et remercié pour son implication en tant que président, ainsi que pour la bonne gestion de l'asbl V.Esp-o.

Eliane PIRONNET



Vespa pikniko



Cette année encore, nous avons pu organiser notre Vespa Pikniko. Nous étions une petite vingtaine et le temps était magnifique. C'est l'occasion de se rencontrer d'une manière non-formelle et en français pour permettre aux « éternels komencantoj » de se retrouver sur un même pied d'égalité. Les membres des différents groupes ont pu faire mieux connaissance l'un avec l'autre, et cela a enrichi l'appartenance au mouvement. Une rencontre informelle donc, et très enrichissante. Rendez-vous est pris pour l'an prochain.

Le Congrès du Benelux à Ypres

La Beneluksa Kongreso en Ipro 23-25/9

Pli ol 70 esperantistoj partoprenis en la ĉi-jara Beneluksa Kongreso en Ipro. Ili venis el Angolo, Germanio, Nederlando, Francio, Svislando kaj el ĉiuj regionoj de Belgio por kune sperti la emociojn kaj sentojn de Paco.

Danke al Piet Glorieux, kiu sukcesis profiti la okazon por prezenti la Esperanto-movadon al la publiko, ni kune ĝuis la oficialan programon de la Internacia Tago de Paco en Ipro, urbo de paco. Ni ĉeestis koncerton de la fama koruso Vamos Pra Lutar en la iama preĝejo de Sankta Jakobo kaj, kompreneble, la "Last Post", ĉiutaga memoriga ceremonio ekde 1928, ĉe la Menenpoort.

Multaj aliaj turistoj venis per buso sabate, la 24-an de septembro, al Ipro. Mankis nur en la programo la etendado de la plej granda pacflago en la mondo sur la Granda Placo; la urbeŝtaro ne volis riski damaĝi pro la pluvo tiun gigantan flagon kudritan dum 200 horoj de 30 virinoj. Tio estis parto de nia sabata posttagmeza programo, sed ne nur. En la Buĉista Gildomo (14-a jarcento), ni renkontis per videokonferenco Taeko Osioka, japanino el Hiroŝimo naskiĝinta en 1947, kiu ĉiam okupiĝis pri civitanaj agadoj kontraŭ nukleaj armiloj. Tio

estis okazo konigi Esperanton al la ĉeestanta publiko, inkluzive de influaj homoj el la urbo. Kiki Tytgat, prezidantino de la Belga Esperanto-Federacio, parolis pri Esperanto kaj Piet intervjuis tiu ĉi gravan esperantistinon de Japanio pri ŝia agado.



Dimanĉe, ni vidis filmeton pri ŝi kaj de ŝi dum interesa diskuto inter ni. Multaj el ni bedaŭras, ke pro (interkontinentaj) aliancoj, ni, la homoj, ne plu havas la rajton libere decidi aŭ premi niajn registarojn por redukti nuklean energion. Aliflanke, la svisaj esperantistoj bedaŭras, ke financaj interesoj tro ofte superas la veran neŭtralecon de Svislando. Ni faris ankaŭ grandan paŝon por rekoni la diferencon inter milita agado, eĉ pli katastrofa venĝa ago, aŭ eĉ ekstremaj decidoj por devigi la finon de la milito, kiel en Ipro en 1918 kaj en Hiroŝimo, Dresdeno. Berlino, en 1944, ekzemple. Logiko de milito estas vera teruro.

Estis emocio dum la koncerto orientita, kompreneble, al la temo Paco, sed ankaŭ kun epokaj kantoj pri la morto aŭ malapero de soldatoj "kies reveno ankoraŭ atendas". Nun tio estas pli ol 100 jaroj poste (1918). Dum la lastaj 100 tagoj de milito, 600 000 soldatoj perdis sian vivon en la regiono. La urbo estis tute bombardita kaj preskaŭ tute detruita. La loĝantaro de la urbo duoniĝis falante de 32 787 al 16 908. Denove estas nun 34 988 loĝantoj kaj la malnova urbocentro estas rekonstruita idente. Sed ĉie en la regiono troviĝas militaj tombejoj, monumentoj, malĝojaj rememoroj, kiel la *Menenpoort* kun la nomoj de soldatoj mortigitaj aŭ ne trovitaj, el kiuj la plej multaj venis el Afriko, Aŭstralio aŭ Azio sub la flagoj de la Brita Imperio.

Emocioj kaj sentoj. Tio estis la komuna fadeno de la laborrenkontiĝo proponita de Mirejo Grosjean. Povi rekoni kaj paroli pri ili estas la komenco de konfliktoŝolvado (vidu

la ligilon ĉe *Edukado.net*). Dum ĉi tiu semajnfino mi multfoje havis sentojn de profunda tristeco.

Mi malfacile komprenas, kiel oni povas vivi en urbo, kiu faras turismon el sia malfeliĉo, kaj kiu ne havas alian elekton ol daŭre insisti pri la absoluta neceso disvolvi politikojn de paco. Mi do ankaŭ rekonis mian grandan bezonon de Paco ĉie kaj ĉiam en mia vivo. Tial, mi ŝatus, ke mia lando havu ministerion pri paco dotitan per granda buĝeto kaj respondecan pri paco kaj diplomatio, edukado, komerco, sano kaj ankaŭ malgranda buĝeto de defendo.

Kompreneble, ni, kiel kutime, ekzercis ankaŭ la akuzativon, ni kunvenis ĉirkaŭ loka lupolbiero, faris planojn por 2023 kaj 2024: publikigo de libro, vojaĝoj, kursoj, kongresoj ktp. Estis denove bona ŝanco fari novajn amikojn aŭ plifortigi ekzistantajn amikecojn.

Kiel kutime ĝi estis intensa.

Dankon al Piet Glorieux kaj An Olijslagers pro la perfekta organizado. Ankaŭ al ĉiuj, kiuj proponis, lige kun la Pactemo (aŭ ne), poemon, kantojn, altnivelajn prelegojn, interesajn ludojn, origami-faldadon kaj muzikon sur tipaj citroj! De Iep, la gastejon, ni aplaŭdis pro ĝia amika bonvenigo en iliaj lokoj kaj por la bongustaj manĝoj.

Marilyn DROOG



Belgicismes et espéranto

Belga dialekto kaj Esperanto

Les journaux ont signalé récemment que deux nouveaux belgicismes étaient entrés dans le Larousse : « sorteur » et « dagobert ». On pourrait donc se demander comment traduire convenablement en espéranto « le sorteur mangeait un dagobert » ? Dans l'espéranto les particularités régionales ont rarement leur place, d'autant plus que dans la mesure du possible, le caractère international doit être une priorité. Il serait difficile pour un chinois de pouvoir apprécier pleinement nos particularismes régionaux. Il n'en reste pas moins que dans un soucis de nuance, distinguer le « dagobert » d'un simple sandwich pourrait parfois se poser. Et il ne faut pas oublier notre célèbre « pistolet » qui en France est un petit pain rond 'ronda paneto', donc à surtout ne pas traduire par une arme ou un outil 'pisto'lo'.

Traduire « sorteur » par 'elpeligisto' ou « dagobert » par 'garnita bastonforma pano' me semble un peu lourd. Ce problème peut justifier l'apparition dans l'espéranto aussi, de néologismes mais en n'oubliant pas que cela ne facilite pas l'acquisition de la langue pour un étranger, si on en abuse !

Si les francophones du Québec, de Suisse, de Belgique de France ou d'Afrique n'ont en général pas de véritables difficultés pour se comprendre, il n'en reste pas moins vrai que certaines expressions régionales posent parfois problèmes même pour celui qui parle français. Il suffit de voir l'étonnement d'un parisien à Bruxelles, quand on lui dit de prendre le tram nonante. Et que dire de la Suisse avec son octante ! On peut constater que pour ces mots, l'espéranto est plus logique avec ses 'sepdek', 'okdek', et 'naŭdek'.

On sait que belges et français n'ont pas le même vocabulaire pour les repas : déjeuner, dîner, souper, alors que les français disent : petit déjeuner, déjeuner, dîner. L'espéranto à nouveau a choisi des expressions plus évidentes pour un public international : 'matenmanĝo, tagmanĝo, vespermanĝo'. Une collation est un « repas léger » ou un « en-cas » : on a 'manĝeto' mais il existe aussi 'kolazono' !

Et comment traduire notre sympathique « dix-heure », sinon par 'manĝeto meze de la mateno' ?

Parfois la différence est minime : « Aller aux toilettes » en France, « aller à la toilette » en Belgique. Les belges en profitent pour prétendre que c'est normal, car en France, il fallait en essayer plusieurs pour en trouver une propre. Les anglais préfèrent utiliser le mot WC 'water closet' et les italiens le mot retraite 'ritiratta'. L'espéranto utilise dans ce cas le mot 'necesejo', au singulier, consacré curieusement par l'usage, alors que la racine 'toilet-' serait préférable car très internationale.

On trouve aussi de nombreuses différences entre les deux parlars pour les domaines de l'administration : On parle de « maire » en France et de « bourgmestre ou maïeur » en Belgique. Un adjoint au maire est l'équivalent d'un échevin belge. En espéranto, on utilise 'urbestro', et on préfère le mot « belge » 'skabeno' plutôt que 'urbestrhelpanto'. Un pensionné est un retraité en France : soit 'pensiulo, emerito'. Une séniorie ou un home est une maison de retraite : 'maljunulejo'.

De même, dans le monde de l'enseignement : il y a des différences entre collège, athénée, lycée, académie,.... L'espéranto préférera préciser les étudiants concernés, par 'infanlernejo, mezlernejo, superlernejo'. Un instituteur belge est un « professeur des écoles » en France. On utilisera ici plutôt 'instruisto'. L'élève belge utilise des copions, le français des anti-sèches : une bonne traduction serait 'stelkopiilo'. L'élève belge risque d'être « busé » alors que le français

sera « recalé », à traduire alors simplement par 'rifuzita'. Une latte belge est une règle plate graduée : 'gradigita rektilo' ou 'liniilo'.

On trouve aussi de nombreux belgicismes dans la vie de tous les jours. Une liste complète existe sur Internet : <<https://www.lecameleon.eu/belgicismes.php>>. Pensons à « loque à reloqueter », au « cougnou », ou au « nic-nac ». Pour un français notre délicieux chicon est une endive : 'endivio'. Notre irremplaçable « spéculoos » n'existe pas dans le PIV : il faudra se contenter de 'kandizita biskvito'. Nulle trace non plus dans le PIV de notre magnifique « carabistouille » qu'il faudra par exemple traduire, faute de mieux, par 'malseriozaĵo' (baliverne) ou 'malserioza ŝerco' (blague).

Pour certaines expressions typiquement belges, il serait stupide de les traduire mot-à-mot. Quelques exemples : « tirer son plan » = se débrouiller : 'elturniĝi', 'sin helpi'. « battre le beurre » = s'embrouiller : 'konfuziĝi'. « Se casser la pipe » = tomber : 'fali'. « Faire de son nez » = être prétentieux : 'esti pretendema, aroganta'. « Jouer avec les pieds de quelqu'un » = se moquer de quelqu'un : 'moki'. Dans le PIV, on trouve aussi 'inciteti' Mais en traduisant ainsi, on perd évidemment toute la « saveur » régionale de l'expression.

Claude GLADY

Multlingva Akcelilo : nouvelle édition pour les écoles

Le Multlingva Akcelilo (Accélérateur de multilinguisme) est un plan de cours permettant une introduction à l'apprentissage des langues étrangères afin d'en accélérer l'acquisition. Il s'adresse aux enfants de 8 à 10 ans ou plus pour une utilisation en classe. Dans ce cours, les élèves acquièrent les bases de l'espéranto, langue conçue pour être apprise rapidement et facilement. Espéranto-France met à disposition des enseignants une nouvelle édition du matériel pédagogique.

Ce cours, découpé en 30 unités, représente environ 60 heures de cours. Il permet aux élèves d'acquérir rapidement les bases de l'espéranto grâce à des activités permettant une mise en pratique dès la première leçon.

Le matériel pédagogique qu'Espéranto-France met aujourd'hui à disposition des enseignants reprend le matériel initialement conçu dans le cadre d'un projet international financé par Erasmus+ (voir la présentation du projet dans le numéro 605 dans la revue *le Monde de l'Espéranto* - <https://mallonge.net/mla2022>)

<https://mla.esperanto-france.org>



Connaissez-vous la différence ?




bluso

speco de muziko, precipe kanta, naskita en Usono



bluzo

malstrikta vesto kovranta la superan parton de la korpo kaj tenata de zono ĉe la talio, portata de virinoj, knaboj, maristoj




busto

supera parto de la homa korpo, kun la kapo kaj la brusto; skulptaĵo prezentanta ĉi tiun parton, ofte sen la brakoj



brusto

la antaŭa parto de la homa korpo, de la kolo ĝis la ventro, kie sidas la mamoj kaj en kiu sidas la pulmoj



cirklo

kurbo konsistanta el ĉiuj punktoj en ebena kun fiksa distanco al la centro de la cirklo



cirkelo

ilo kun du moveblaj, ĉarnire kunigitaj brakoj, uzata por desegni cirklojn aŭ mezuri liniojn



deserto

lasta parto de Eŭropeaj manĝoj, konsistanta el fromaĝo, fruktoj, dolĉaĵoj ks.



dezerto

seka, senviva, kutime sabla regiono



diserto

universitata prezento de detala metoda studaĵo pri scienca, filozofia aŭ literatura temo



dizerto

fuga el militista servo kun la intenco ne plu reveni al ĝi

La communauté espérantophone

Esperanta komunumo: pripensoj kaj aspiroj

La vivanta flanko de la Esperanta komunumo gravas, tial mi esperas ke ni ĉiuj deziras kontribui tiusence, ankaŭ en la Vespera komunumo.

Kion signifas Esperanta Komunumo? La homoj kiuj kontribuas al la Esperanta kulturo (mi pensas tuj al muzikistoj, verkistoj...), sed ankaŭ estas tiuj kiuj partoprenas en la renkontiĝoj aŭ kreas, organizas ilin. Estas ankaŭ tiuj samaj homoj aŭ aliaj kiam ili rete malkovras, kundividigas la abundan Esperantan kulturon. Mi opinias ke la retejoj restas nepraj iloj por disvastigi, konatigi tiun kulturon, sed la rolo de la homo restas centra por la vivo de la Esperanta komunumo.

Ni povus imagi ekzemple pasigi tutan jaron legante Esperantajn librojn ... necesus pli ol unu vivo por legi la tutan libraron, la revuaron senĉese aperantan; aŭskulti senfine podkastojn ktp; spekti ĉiajn interesajn videojn, malkovri novajn retejojn... Ĉu tiumaniere ni estas vivanta Esperanta komunumo?

Laŭ mi necesas la kundivido, la viva flanko kiu aperas kiam homoj kundividigas spertojn. Mi povas aserti ke la kulturo estigu tian ligan, « ligan inter la aliaj kaj mi mem », ĉar ĝi

malfermigas min al la riĉeco de ĉiu medio kaj de ĉiu el ni. Ĝi instigas la komunikadon, ĝi estas renkonto de la alia. Ni konscias ke la kulturo estas malfermiĝo al la mondo, scivolemo, intereso por la malsimpleco de la realo ... ĝi kondukas al interesiĝo pri diversaj fakoj kiel filozofio, scienco, arto....

Post tiuj seriozaj pripensoj, revenu iom al niaj diversaj spertoj, deziroj, travivaĵoj, esploroj rilate ekzemple al arto. En la ĉiutaga vivo ni ofte bezonas, serĉas, ĝuas tiajn momentojn: povas esti sperto de lernado (bindaĵo, akvarelo...), vizito de amiko kiu pentras, vizito de ekspozicio pri fama japana pentristo... Mia malgranda sperto: ekde la hejmmestado mi amuziĝas lernante kaj ludante tiun malgrandan kvarkordan gitaron. Por lerni ĝin estas nuntempe tiom da videoj en la reto, mi povas ankaŭ aŭskulti talentajn junulojn aŭ pliaĝulojn en Esperanto tra iliaj blogoj. La kroma intereso estas ke mi kunigas lernadon de la instrumento kaj Esperanton: estas multege da kanzonoj tradukitaj aŭ jam en Esperanto. Alia avantaĝo estas la plibonigo de mia akĉento. Mia deziro estas ke la muziko estu pli ĉeesta dum niaj renkontoj ... povas esti jam simple kunporti KD-on de konataj muzikistoj kiujn ni havas hejme...

Mi sendas koran dankon al Yves N. pro la kurso (per Zoom). Li konigis al ni interesajn retejojn, interalie « Esperantaj verkoj » kie mi trovis famajn kanzonojn kaj ĉefe malpli konatajn kiel « kantaro el Norda Eŭropo ». Interalie tie mi trovis ankaŭ poemaron, rakontojn, libretojn kiel « la salto de konscio » de Helmut Lasarczyk (tradukita de Klaus Frieze).

Mi deziras kapti vian atenton pri iu observo: en infanĝardenoj niaj infanoj preskaŭ ne plu kantas, en bazaj lernejoj ili ne havas artan aŭ manlaboran momenton. Estas vere trista realo ... Kiu misfaro, perdo, manko ... kiam ni scias, jes, ni ne povas fajfi pri tio : nia cerbo havas maldekstran parton kiu regas la logikon, la racion. La dekstra duono de la cerbo regas la emociojn, intuicion, kreemon. Kial ne prizorgi ambaŭ flankojn? Kial neglekti tion? Ĉar la instruistoj ne estas preparitaj en tiu senco ... ĉar ... ĉar ... (Ĉu estos temo por venontfoje?)

Por apogi mian diron, jen eltiraĵo el la libro de Luc de Brabandere (pensée magique, pensée logique, Editions du pommier, 2008): penso lineara kaj racia funkcias en iu senduba, firma mondo, en kiu ni povas plani nian estonton, sed nun en nia duba, nestabila mondo, kompleksa kaj « en movo » ... estas finita. La diferenco ekde nun, estas la aŭdaco malfermiĝi al la novo, al la imagkapablo, al la kapablo eliri el la kompetencokadro, ankaŭ ... reiri al tiu kadro por apliki tie siajn novajn ideojn ... dank'al nia maldekstra hemisfero.

Kiu deziras nuanci, kompletigi tiun diraĵon, esprimi sian vidpunkton? Esprimi sian senton, siajn dubojn kaj esperojn? Antaŭdankon kaj bonvenon al ĉiuj.

Catherine ROYAUX



Verkoj – hejmo por verkistoj kaj legantoj

La retejo verkoj.com estas kreita en 2017 de du israelaj esperantistoj: Amir Naor kaj Eldad Salzman. Jen kiel ili ĝin priskribas en la paĝo <https://verkoj.com/html/pri-ni> :

Multaj verkistoj kontribuis kaj konstante kontribuas al la Esperanta kulturo. Ili ne agas pro ekonomiaj konsideroj, sed male: kreado en Esperanto postulas, ke ili investu multe da tempo kaj rimedoj, kelkfoje eĉ fronte al indiferenta kaj nekomprenema ĉirkaŭaĵo. Ili agas nur pro la amo al la literaturo kaj al la lingvo, kaj sentas, ke ili plenumas gravegan taskon. Oni povas konsideri ilin naivuloj kaj nerealaj homoj, sed dum la tempopaso ili donacis al Esperanto veran, neatenditan trezoron – originalajn kaj riĉajn literaturon kaj poezion, kiuj havas memstaran valoron per si mem en la monda kulturo. Tiu ĉi retejo estas dediĉita al ili. Ĝia celo estas igi iliajn verkojn alireblaj al la vasta publiko. Ĉiuj verkoj en tiu ĉi retejo estis transdonitaj de la verkistoj aŭ tradukistoj mem. Ĉiuj rajtoj estas rezervitaj al la verkistoj (krom se menciite alie).

<https://verkoj.com>

Novaĵoj de Esperantujo

Voĉlegita raporto pri la UK en Montrealo en facila lingvo

Vendrede... Mi sidas en la flughaveno. Mia flugo al Montrealo foriros post unu horo. Mi vojaĝas al la Universala Kongreso. Mi estas nervoza. Ekscitita. Timema. Maltrankvila. Mi bedaŭras, ke mi maltrafis la lastan kunvenon de mia loka klubo. Mi bezonas pli ekzerci min paroli Esperanton. La 107-a Universala Kongreso (UK) de Esperanto ja estas speciala okazo. La UK okazas en Montrealo (Kanado) je la 6-13 aŭgusto 2022. Trijaraj pasis de post la lasta Universala Kongreso. La evento estis virtuala en 2020 kaj 2021 pro la pandemio. Sabate, posttagmeze... Mi promenas tra preĝejo dum la ekskurso al Malnova Montrealo. Mi parolas kun virino el Sud-Koreio pri ŝia religio. Mi komprenas ŝin. Ŝi komprenas min. -> *Plu legu aŭ plu aŭskultu en* <https://mallonge.net/raportomontrealo>


Tajpi – clavier espéranto pour Windows

Dans l'alphabet espéranto, il existe 6 lettres diacritiques (ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ŝ, ŭ) qui ne peuvent pas être tapés avec des configurations de clavier Windows habituelles. Tajpi est un logiciel qui vous permet de saisir ces lettres avec facilité et sans modifier la configuration de votre système. Tajpi a été testé pour Windows 7, 8, 10 et 11. Le fichier et la procédure d'installation ont été vérifiés par l'équipe du site Komputeko en septembre 2022. <https://komputeko.net/tajpi>

Bildrakonto pri la vivo de Zamenhof

La vivo de Zamenhof estas libere rigardebla projekto por krei bildrakonton en Esperanto. Jean-Pierre Cavelan estas pentristo el urbo Nico en suda Francio. Unu el liaj daŭraj projektoj estas krei bildrakonton pri la vivo de Zamenhof en dosierformo adaptita al nunaj poŝtelefonoj. Konatiĝu kun la verkisto kaj lia laboro per interesa intervjuo de Ĉina Radio Internacia, kaj mem rigardu kaj sekvu la progreson de la bildrakonto kaj ĝian tradukon en Esperanton! <https://mallonge.net/bildrakonto>

LUDOVIKO LAZARO ZAMENHOF



BIOGRAFIO DE LA KREINTO DE ESPERANTO

V.Esp-o dispose d'une bibliothèque de plus de 1700 livres à Cerfontaine. Elle est visitable sur rendez-vous chez le bibliothécaire Claude Glady.

Renseignements : cglady@arcadis.be

Rencontres et cours réguliers :

Charleroi

Rue des Champs, 124 à Marcinelle

Pour y participer : Michèle Villers

michele.villers@hotmail.com

Eghezée

Contact : Jean Annet - jean.annet@gmail.com

com - 0495 10 32 30

Huy

Contact : Eliane Pironnet - epironnet@

gmail.com - 0494 230 234

Liège

Contact : Eric Nemes - eric.nemes@gmail.com

.com - 0494 230 234

Tables de conversation :

Liège

Chez « Toutes directions ». Infos : 04 262

20 64 - <https://mallonge.net/td>

Louvain-la-Neuve

Catherine Royaux

cat.royaux@netcourrier.com

Participons ensemble Zamenhoffesto en Ostendo

La 17-an de decembro ĉiuj belgaj Esperantokluboj kune festos la tradician Zamenhoffeston en Ostendo. La loka grupo La Konko invitas vin; ili planas aperitivon, komunan manĝon, paroladojn, koncerton, libroservon kaj tombolon. En la monato decembro ĉiu luma dekoracio estas ŝaltita en la centro de Ostendo. Bonvenon!



<https://eventaservo.org/e/zamfesto2022>

Autres personnes ressources

- Contact presse : Jean-Pol Sparenberg 0475 272 319 jpsparenberg@brutele.be
- Jeunes et initiation : Valère Doumont 0485 517 552 doumontvalere@yahoo.fr
- Cerfontaine : Claude Glady 071 64 49 16 cglady@arcadis.be
- Charleroi : Rudy Cogniaux 0492 710 974
- Comines-Warneton : Jean-Claude Thumerelle - jcthum@gmail.com
- Plombières : Bernadette Poncelet, bernadetteponcelet@skynet.be
- Verviers : Jean-Marie Jacques jeajacques@voo.be

**Voulez-vous apparaître dans cette liste ?
Contactez-nous !**

L'espéranto c'est dans la poche

Cette brochure est une bonne base pour commencer à apprendre l'espéranto. Cette langue internationale s'apprend plus facilement que les autres du fait de sa grammaire logique et de son système pratique de construction des mots.

Découvrez d'abord l'espéranto dans la première partie et faites ensuite les exercices de la deuxième partie. À chaque leçon de grammaire correspond un exercice. À raison d'une leçon par jour, vous pourrez au bout d'une semaine comprendre un texte simple et faire quelques phrases.

Découvrez une langue en une semaine



à emporter !

L'espéranto, c'est dans la poche

découvrez une langue en une semaine



Recevez cette brochure gratuitement !

- via notre site : esperanto-wallonie.be
- communiquez votre adresse à esperanto.wallonie@gmail.com
- envoyez vos coordonnées par sms au n° de tél : 0485 51 75 52

Editeur responsable: Jean ANNET
V. Esp-o : rue de la Terre Franche, 31 - 5310 Longchamps
Exp : Jean-Pol Sparenberg
Ruelle de Thuin, 20 - 6540 Lobbes

6540-dépôt
Lobbes
P001014

